




Simbegwire

Simbegwire


 Rukia Nantale

 Benjamin Mitchley

 dohlam

 5

 Esperanto [eo](#) / English [en](#)



Kiam la patrino de Simbegwire mortis, ŝi ege malĝojis. La patro de Simbegwire faris laŭeble plej bone por varti sian filinon. Malrapide ili eklernis kiel denove senti sin feliĉaj, sen la patrino de Simbegwire. Ĉiumatene ili sidiĝis kaj parolis pri la venonta tago. Ĉiuvespere ili kune preparis vespermanĝon. Post kiam ili lavis la manĝilaron, la patro de Simbegwire helpis ŝin fari sian hejmtaskon.

...

When Simbegwire's mother died, she was very sad. Simbegwire's father did his best to take care of his daughter. Slowly, they learned to feel happy again, without Simbegwire's mother. Every morning they sat and talked about the day ahead. Every evening they made dinner together. After they washed the dishes, Simbegwire's father helped her with homework.



Iun tagon, la patro de Simbegwire malfrue revenis hejmen. “Kie vi estas, mia infano?” li vokis. Simbegwire kuris al sia patro. Ŝi haltis senmove, kiam ŝi vidis ke li tenas la manon de iu virino. “Mi volas, ke vi renkontu iun specialan, mia infano. Jen Anita,” li diris ridete.

...

One day, Simbegwire’s father came home later than usual. “Where are you my child?” he called. Simbegwire ran to her father. She stopped still when she saw that he was holding a woman’s hand. “I want you to meet someone special, my child. This is Anita,” he said smiling.



“Saluton Simbegwire, via patro diris multe al mi pri vi,” diris Anita. Sed ŝi nek ridetis, nek prenis la manon de la knabino. La patro de Simbegwire ĝojis kaj ekscitiĝis. Li parolis pri la estonteco, kiam ili tri kune vivos, kaj kiel bona estos ilia vivo. “Mia infano, mi esperas ke vi akceptos Anita kiel patrinon,” li diris.

...

“Hello Simbegwire, your father told me a lot about you,” said Anita. But she did not smile or take the girl’s hand. Simbegwire’s father was happy and excited. He talked about the three of them living together, and how good their life would be. “My child, I hope you will accept Anita as your mother,” he said.



La vivo de Simbegwire ŝanĝiĝis. Ŝi ne plu havis tempon por sidi matene kun sia patro. Anita donis tiom da hejmtaskoj al ŝi, ke ŝi estis tro laca por fari siajn lerneajn taskojn vespere. Post la vespermanĝo ŝi tuj enlitiĝis. Ŝia sola konsolo estis ŝia kolora lankovrilo, kiun ŝia patrino donis al ŝi. La patro de Simbegwire ŝajne ne rimarkis, ke lia filino malĝojas.

...

Simbegwire's life changed. She no longer had time to sit with her father in the mornings. Anita gave her so many household chores that she was too tired to do her school work in the evenings. She went straight to bed after dinner. Her only comfort was the colourful blanket her mother gave her. Simbegwire's father did not seem to notice that his daughter was unhappy.



Post kelkaj monatoj la patro de Simbegwire diris al ili ke li foriros iom da tempo. "Mi devas vojaĝi por mia laboro," li diris. "Sed mi scias ke vi ambaŭ prizorgos unu la alian." La vizaĝo de Simbegwire malridetis, sed ŝia patro ne rimarkis pri tio. Anita nenion diris. Ankaŭ ŝi ne ĝojis.

...

After a few months, Simbegwire's father told them that he would be away from home for a while. "I have to travel for my job," he said. "But I know you will look after each other." Simbegwire's face fell, but her father did not notice. Anita did not say anything. She was not happy either.



La situacio malboniĝis por Simbegwire. Se ŝi ne finfaris siajn taskojn, aŭ ŝi plendis iomete, Anita batis ŝin. Kaj dum la vespermanĝo, la virino manĝis la plejparton de la manĝaĵo, lasante nur kelkajn restaĵojn por Simbegwire. Ĉiuvespere Simbegwire ploris, ĝis ŝi ekdormis, brakumanta la lankovrilon de sia patrino.

...

Things got worse for Simbegwire. If she didn't finish her chores, or she complained, Anita hit her. And at dinner, the woman ate most of the food, leaving Simbegwire with only a few scraps. Each night Simbegwire cried herself to sleep, hugging her mother's blanket.



Iun matenon Simbegwire malfrue ellitiĝis. “Vi estas pigrulino!” Anita kriis. Ŝi eltiris Simbegwire el la lito. La valora lankovrilo kroĉiĝis sur najlo kaj duoniĝis.

...

One morning, Simbegwire was late getting out of bed. “You lazy girl!” Anita shouted. She pulled Simbegwire out of bed. The precious blanket caught on a nail, and tore in two.



Simbegwire malĝojegis. Ŝi decidis forkuri de sia hejmo. Ŝi prenis la pecojn de la lankovrilo de sia patrino, pakis iom da manĝaĵo kaj foriris el la domo. Ŝi sekvis la vojon, kiun prenis ŝia patro.

...

Simbegwire was very upset. She decided to run away from home. She took the pieces of her mother's blanket, packed some food, and left the house. She followed the road her father had taken.



Kiam vesperiĝis, ŝi surgrimpis altan arbon apud rivereto kaj pretigis liton por si mem en la branĉoj. Dormonte, ŝi kantis, "Panjo, panjo, panjo, vi forlasis min. Vi forlasis min kaj neniam revenis. Paĉjo ne plu amas min. Panjo, kiam vi revenos? Vi forlasis min."

...

When it came to evening, she climbed a tall tree near a stream and made a bed for herself in the branches. As she went to sleep, she sang: "Maama, maama, maama, you left me. You left me and never came back. Father doesn't love me anymore. Mother, when are you coming back? You left me."



La sekvan tagon Simbegwire kantis la kanton denove. Kiam la virinoj venis por lavi siajn vestaĵojn en la rivereto, ili aŭdis la malfeliĉan kanton, kiu eliris de la alta arbo. Ili kredis, ke tio estas nur la vento, kiu susuras en la folioj, kaj daŭre faras sian laboron. Sed unu el la virinoj aŭskultis atente la kanton.

...

The next morning, Simbegwire sang the song again. When the women came to wash their clothes at the stream, they heard the sad song coming from the tall tree. They thought it was only the wind rustling the leaves, and carried on with their work. But one of the women listened very carefully to the song.



Tiu virino suprenrigardis en la arbon. Kiam ŝi vidis la knabinon kaj la pecojn de la kolora lankovrilo, ŝi ekkriis, "Simbegwire, infano de mia frato!" La aliaj virinoj haltigis la lavadon kaj helpis Simbegwire grimpi malsupren el la arbo. Ŝia onklino brakumis la knabineton kaj klopodis konsoli ŝin.

...


This woman looked up into the tree. When she saw the girl and the pieces of colourful blanket, she cried, "Simbegwire, my brother's child!" The other women stopped washing and helped Simbegwire to climb down from the tree. Her aunt hugged the little girl and tried to comfort her.



La onklino de Simbegwire portis la infanon al sia hejmo. Ŝi donis varman manĝaĵon kaj enlitigis ŝin per la kovrilo de ŝia patrino. Tiu nokto Simbegwire ploris, ĝis ŝi ekdormis. Sed tiuj estis larmoj de malŝarĝiĝo. Ŝi sciis, ke ŝia onklino vartos ŝin.

...

Simbegwire's aunt took the child to her own house. She gave Simbegwire warm food, and tucked her in bed with her mother's blanket. That night, Simbegwire cried as she went to sleep. But they were tears of relief. She knew her aunt would look after her.



Kiam la patro de Simbegwire revenis hejmen, li trovis ke ŝia ĉambro estas malplena. “Kio okazis, Anita?” li demandis pezokore. La virino klarigis ke Simbegwire jam forkuris. “Mi nur volis ke ŝi respektu min,” ŝi diris. “Sed eble mi tro severis.” La patro de Simbegwire foriris el la domo kaj iris en la direkto de la rivereto. Li daŭre iris al la vilaĝo de sia fratino por sciiĝi, ĉu ŝi vidis Simbegwire.

...

When Simbegwire’s father returned home, he found her room empty. “What happened, Anita?” he asked with a heavy heart. The woman explained that Simbegwire had run away. “I wanted her to respect me,” she said. “But perhaps I was too strict.” Simbegwire’s father left the house and went in the direction of the stream. He continued to his sister’s village to find out if she had seen Simbegwire.



Simbegwire ludis kun siaj kuzoj, kiam ŝi vidis malproksime sian patron. Ŝi timis ke li eble koleras, do ŝi kuris en la domon por kaŝi sin. Sed ŝia patro iris al ŝi kaj diris, "Simbegwire, vi jam trovis perfektan patrinon por vi mem. Iu, kiu amas vin kaj komprenas vin. Mi fieras pri vi kaj mi amas vin." Ili konsentis ke Simbegwire restu kun sia onklino tiom longe, kiom ŝi volos.

...

Simbegwire was playing with her cousins when she saw her father from far away. She was scared he might be angry, so she ran inside the house to hide. But her father went to her and said, "Simbegwire, you have found a perfect mother for yourself. One who loves you and understands you. I am proud of you and I love you." They agreed that Simbegwire would stay with her aunt as long as she wanted to.



Lia patro vizitis ŝin ĉiutage. Fine li venis kune kun Anita. Ŝi etendis sin kaj prenis la manon de Simbegwire. “Mi tre bedaŭras, mia etulo, mi eraris,” ŝi kriis. “Ĉu vi jam permesos min reprovi?” Simbegwire rigardis sian patron kaj lian maltrankvilan vizaĝon. Tiam ŝi paŝis malrapide antaŭen kaj ĉirkaŭbrakis Anita.

...

Her father visited her every day. Eventually, he came with Anita. She reached out for Simbegwire’s hand. “I’m so sorry little one, I was wrong,” she cried. “Will you let me try again?” Simbegwire looked at her father and his worried face. Then she stepped forward slowly and put her arms around Anita.



La sekvan semajnon Anita invitis Simbegwire, kune kun ŝiaj kuzoj kaj onklino, al la domo por manĝi. Kia manĝego ĝi estis! Anita pretigis ĉiujn el la plej amataj manĝaĵoj de Simbegwire, kaj ĉiuj manĝis ĝis sato. Poste la infanoj ludis, dum la plenkreskuloj diskutis. Simbegwire sentis sin feliĉa kaj kuraĝa. Ŝi decidis ke post nelonge ŝi revenos hejmen por vivi kune kun sia patro kaj duonpatrino.

...

The next week, Anita invited Simbegwire, with her cousins and aunt, to the house for a meal. What a feast! Anita prepared all of Simbegwire's favourite foods, and everyone ate until they were full. Then the children played while the adults talked. Simbegwire felt happy and brave. She decided that soon, very soon, she would return home to live with her father and her stepmother.



Global Storybooks

globalstorybooks.net

Simbegwire

Simbegwire



Rukia Nantale



Benjamin Mitchley



dohliam (eo)

